M. 15144:1.

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

(översättn. 1 sida)

Tjeckoslovakien

uppt. år 1952

Svar å LUF 85 rör. hästkött och hästslakt m. m.

s. 1.

uppt. år 1952 Tjeckoslovakien

M. 15144:1

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

(55)

ESPERANTO

Stráž n.Nisou la..........

Tre estimataj!

Leginte vian alvokon en la gazeto,mi permesas al mi iomete priskribi la temon el mia vidpunkto.
Certe estus pli kompetenta tian aferon priskribi koncernanta ĉevalbuĉisto.Li povus ankaŭ diri kiel li estis malŝatata de siaj kunloĝantoj kaj eĉ ofte okazis,ke li devis loĝi izole ie ekster la vilaĝo.
Tiamaniere loĝis tiuj homoj kaj vivis antaŭ multaj jaroj.Tiam oni nomis la ĉevalbuĉiston aŭ hundo buĉiston per malĝentilaj nomoj kiel ekzemple senfeligisto aŭ ĉeĥe,, ras" - aĉa buĉisto. La viandon aĉetadis precipe nur malriĉaj homoj aŭ iam ankaŭ nur tiaj homoj,kiuj kredis,ke ili estos fortaj kaj sanaj.

Sed la jaroj pasis kaj hodiaŭ en nia lando tiaj homoj estas egalrajtaj civitanoj kaj ili ne plu loĝas izole malantaŭ komunumoj. Dum nia nuna tempo la ĉevaloj ne tiom abundas,anstataŭigas ilin la motoroj kaj la ĉevalviando estas vendata de tempo al tempo en destinita konvena vendejo. La viandon aĉetas, mi dirus,tiel nomataj special~~aj~~ -bongustamantoj.
Mi mem ne apartenas al tiu grupo kaj pro tio mi ne estas kompetenta gin fake kritiki.

Kun sinceraj salutoj

Frant.Pytloun,
Stráž n.Nisou,291,okres Liberec.
ČSR.

Tjeckoslovakien

M. 15144.

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

(55)

Efter att ha läst Edert upprop i tidningen, tillåter jag mig att vidröra ämnet ur min synpunkt.
Säkerligen skulle en hästslaktare vara mera kompetent att beskriva en sådan sak. Han skulle också kunna tala om hur han hatades av dem han bodde tillsammans med och det hände t.o.m. ofta, att han måste bo izolerat någonstans utanför byn. Så bodde och levde dessa människor för många år sedan. Då kallade man hästslaktaren eller hundslaktaren med ohövliga namn som t. ex. "skinnflåare" eller på tjeckiska " ras " - usel slaktare. Köttet köpte i synnerhet endast fattiga människor eller någon gång också endast sådana människor, som trodde, att de skulle bliva starka och friska.
Men åren gick, och i dag är i vårt land sådana människor likaberättigade medborgare, och de bo inte mera isolerat utan kommunen.
Nu för tiden är inte hästarna så talrika, motorerna ersätter dem och hästköttet säljes då och då i bestämda, lämpliga affärer. Köttet köper, skulle jag kunna säga, s.k. speciella finsmakare. Själv tillhör jag inte den gruppen och därför är jag inte kompetent att fackligt kritisera det.

Frant. Pytloun.